nia voĉo

madrida esperanto-liceo januaro 2014

## DU ANONCOJ POR LA MEMBROJ DE MEL

- Ĉu vi rimarkis, ke finiĝis unu jaro kaj komenciĝis nova? Tio implicas ke klubano devas rekotizi al sia loka esperanto-klubo. La jara kotizo plu restas je 12 €, pagebla en la konton de Esperanto-Liceo de Madrid ĉe la banko Sabadell: 0081-7110-98-000 126 6730; aŭ rekte al iu membro de la estraro. Ne forgesu indiki vian nomon ĉe "concepto", ĉar male ni ricevus sennoman enspezon.

- La ĝenerala kunsido de MEL okazos la lundon 27an. Post kelkaj tagoj ĉiuj membroj ricevos la formalan alvokon kun la tagordo, kiu inkluzivos elekton de nova estraro (jen via ŝanco!!).

## INTERNACIA ESPERANTO-TAGO EN MADRIDO

La 15-an de decembro, dimanĉon, oni festis diversloke sur la mondo la Zamenhofan Tagon. Ni madridanoj modeste faris nian eblon kunvenante en luita por la evento spaco, ĉe madrida kvartalo Usera, en sidejo de *Asociación de Vecinos de Zofío*. Nian sinceran dankon al Mati ĉar ŝi serĉis kaj trovis tiun decan ejon!

Tie kunvenis pli ol dudek samideanoj ekde la dekunua matene. Salutis nin sunbrila tago, bonega medio por okazigi la unuan programeron: surstrata vizito al kelkaj interesaj lokoj de la kvartalo, helpe de Félix. Tiel agrable oni atendis la ceterajn geamikojn por solene bonvenigi ilin je la 12a. La enirantoj ne povis ne rigardi etan elmontron fare de Libroservo, afero ĉiam okazinda en ĉia esperanta kunveno.

Alejandro Pareja tuj mirigis la ĉeestantojn per siaj konoj pri horloĝoj. Krome, li permesis nin rekte esplori kelkajn ekzemplerojn kiujn li alportis el sia kolekto. Tio horloĝe daŭris unu horon. Ĉu estas tiom preleginde pri tiu temo? Jes, ja!

Sekvis bilda elmontrado far Manolo Parra pri lia vojaĝo al Belgio kaj Nederlando, titolita "Bicikloj estas ne (nur) por Somero". Ĉia biciklo aperis surekrane: maŝinoj kun bremsoj ne sur la stirilo, eĉ iuj ne posedantaj pedalojn, ĉiuj kadre de belaj urbaj pejzaĝoj. Ĉiuj amuziĝis eksciante, ke Manolo Parra estas ne nur bonega esperantisto, sed ankaŭ imagopova dezajnisto pri bicikloj! Vidi lin saltanta (jes, kangurue sal-tan-ta) sur lia elpensaĵo estas, certe, io altgrade rekomendinda.

Ene de tiu amuza etoso, la esperantistoj faris poste ion ne multe rekomendinda: plu paroli dum oni maĉis abundajn kaj bongustajn (eĉ ekzotikajn) manĝaĵojn alportitajn de la ĉeestantoj. Imagu vin prononcante "ĉu ĝi decas por la tutmonda paco?" kun via buŝo plenplena de buntkolora duonmaĉita kuko!

Posttagmeze Juan del Castillo alportis kelkajn erojn el sia ludkolekto, kaj invitis ĉeestantojn aliĝi al la ludo. Ĉu tial, ke "ni jam estas tie ĉi, kial ne?", aŭ tial, ke "Estus hontinde se mi subite forkurus el la urbo", la fakto estis, ke kelkaj kuraĝiĝis partopreni, unue timeme, poste vigle.

Por fini la programon, oni projekciis la filmon "Esperanto", freŝe eldonitan de SAT.

Denove, oni konstatas ke festi Zamenhof'on estas bone, ke ĝui esperantan etoson bonas ankaŭ. Sed ke eĉ pli bone estas renkonti ĉiun jaron tiujn geamikojn, kiuj parolas tiom strange.

## RADIO VALLEKAS ELSENDIS PROGRAMON GRANDPARTE EN ESPERANTO

Jam kvar fojojn ene de kelkaj monatoj, la alternativa radistacio Radio Vallekas donas spacon al esperanto. La 15-an de decembro, koincide kun la Esperanto-Tago, la programo “La hora impía” elsendis kelkajn intervjuojn.

Plej grava tamen estis la elsendo de la 29-a de decembro, dum kiu tiu programo disponigis unu horon kaj duonon da radia elsendo, dum kiu oni ne nur parolis pri la lingvo sed oni uzis ĝin per

legado de kelkaj beletraĵoj, eldiro de proverboj, poemoj, ktp, kun partopreno de Miguel Fernández, Pedro Sanz, Ángel Arquillos, Miguel Gutiérrez Adúriz, Ricardo Biurrun, Manuel Parra kaj Ana Manero.

La eldon-frekvenco de Radio Vallecas estas 107.5 FM. Se vi ne povis aŭskulti en reala tempo, ne zorgu, la registraĵo jam troviĝas en Bitoteko: http://www.esperanto.es/jspui/handle/11013/4306.

## MADRIDANOJ EN ROTERDAMO

Kiel ni anoncis lastnumere, pasintan 2an de decembro okazis en Roterdamo, en la kongresejo De Doelen, la 3a Ĝenerala Jarkunsido de la Reto Europeana, al kiu Hispana Esperanto-Federacio estis invitita ĉar provizanto de metadatenoj. Ĉeestis ĝin Ana Manero, kiel kunordiganto de la projekto Bitoteko.

Kelkajn tagojn antaŭe, la 30an de novembro, okazis samurbe la ĉijara Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, kaj profitante la vojaĝon de Ana Manero por la kunsido de Europeana, ŝi estis invitita kontribui al la programo per prezento pri Bitoteko. Ĉeestis la Tagon ankaŭ niaj samurbanoj Manolo Parra kaj Francisco Javier Moleón.

## KONGRESOJ EN 2014

La venonta Hispana Kongreso de Esperanto okazos inter la 1-a kaj 4-a de majo 2014, en Arundo (hispane Ronda, en provinco Malago. Andaluzio). Oni povas jam koni la unuajn detalojn pri tiu renkonto en la ĵus inaŭgurita propra retpaĝo, ĉe: http://arundakongreso2014.wordpress.com/.

Dum monato januaro eblas aliĝi jam en favoraj kondiĉoj. Skribu al adreso kongreso@esperanto.es por koni pliajn detalojn.

Oni antaŭvidas celebri dum la kongreso oficialajn ekzamenojn sub la Eŭropa Referenckadro. Se vi emas akiri oficialan titolon, bv. kontakti la organizantojn en la supre menciita adreso.

Laŭ decido de la Estraro de UEA, la 99-a Universala Kongreso, kiu okazos en Bonaero, Argentino, inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto, traktos la temon *"Ĉu la nepoj nin benos? Streboj al daŭripova estonteco"*. Interalie, tiu temo markos la finon de la Monda Jardeko de Edukado por Daŭripova Evoluo (2005-2014), sub aŭspicio de Unesko.

Inter la 6-a kaj 12-a de julio 2014 okazos en marborda kroatia urbo Rijeka la jubilea 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio. La temo de la kongreso estas: *"Justa Eŭropo kun justaj lingvaj rilatoj – malmultekosta komunikado"*. Detalajn informojn kaj la eblon aliĝi vi trovos en la reto http://eeu-kongreso.webnode.com/

La 87a kongreso de SAT okazos de la 9a ĝis la 16a de aŭgusto 2014 en Dinano (Bretonio, Francio). La temo de la kongreso: *"Civitanoj loke agadas por konstrui ontecon"*. Pliaj informoj aperos regule iom post iom en la retejo http://satesperanto.org/-2014-87a-Dinano-.html

## VENONTAJ RENKONTOJ

Post la novjaraj festoj, la 13-an de januaro rekomenciĝos la kutimaj kunvenoj de MEL, ĉiulunde post la 18,30.

Ankaŭ pro tiu kialo ne estis kunvokita babilrondo por la unua sabato de la monato. Plej probable ni kunvenos la duan. Atentu forumojn kaj sociajn retojn por scii pri dato, horo kaj loko.

Novaĵoj kaj detaloj aperas en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/ kaj en retejo http://www.esperanto.es/mel.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com